



# INTERNACIA FERVOJISTO 2015.2



*La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn*

## REDAKTORA RAPORTO

Mi ne ŝatas plendi, sed en la jaro 2014, eĉ ankaŭ dum la du monatoj en la jaro 2015 mi havis multajn malbonajn aferojn. La pasinta jaro donis al mi longan kaj danĝeran malsanon, pro kio mi devis redakti nian fakan revuon „Internacia Fervojisto” kun multaj malfacilaĵoj, sed dank’ al Dio, ke la du membroj de la Redaktora Komisiono helpis plenigi la aktualajn fendaĵojn kaj limdatojn. En la nuna jaro la 30-an de januaro mortis János Patay, kiu estis nia plej agema kaj helpopreta kunlaboranto, membro de la trimembra Redaktora Komisiono, kaj la plej bona amiko. Tiel momente la Redaktora Komisiono havas nur du membrojn. Malgraŭ la malfacilaĵoj en la pasinta jaro ĉiu numero de nia faka revuo IF aperis ĝustatempe, la aspektoj kaj ankaŭ la enhavoj ricevis rekonon de la legantoj. En la jaro aperis ses numeroj de la revuo po 20 paĝoj, papere po 300 ekzempleroj. Entute aperis 52 artikoloj kun 57 fotoj. La nova presejo pretigis la frontpaĝon kaj la lastan paĝon kolore, kaj la limdatojn la presejo ĉiam plenumis. Se oni trastudas la enhavtabelojn por la jaro 2014, povas konstati, ke pri ĉiuj terenoj de la fervojista Esperanto-agado aperis informoj, interesaj artikoloj. Ne nur pri la IFEF-kongresoj kaj estrarkunsidoj, sed pri ankaŭ aliaj internaciaj kaj landaj eventoj ni sciigis, eĉ – helpante la fervojistan E-agadon – ni aperigis en 5 daŭrigoj detalan artikolon pri la broŝuro de la karmemora amiko Dieter Hartig. La fakaj artikoloj bone kompletigis la kondiĉojn de enhavo.

Mi denove dankas al niaj aktivaj kaj diligentaj esperantistoj, al Jan Niemann, Jindrich Tomísek, Heinz Hoffmann kaj Liba Gabalda, kiuj sendis artikolojn, sciigojn kaj interesajn skribaĵojn. Ankaŭ mi dankas al la estraranoj de IFEF la ĝustatempe senditajn diversajn raportojn, protokolojn. Sen iliaj helpoj nia faka revuo ne povus plenigi sian rolon en la Esperanto-movado.

**István Gulyás**  
redaktoro

### FRONTPAĜO:

**La franca urbo Dijon, kie okazos la plivastigita estrarkunsido de IFEF**

### ENHAVO:

Redaktora raporto	22	Tagordoj de la FK	29
Ekskursoj en la 67-a IFK	23	La 31-a Internacia Festivalo	30
Raporto de la Kasisto	27	Kiu posedas kion?	33
Anonco	29	Nekrologo: János Patay	40

## EKSKURSOJ EN LA 67-a IFK

## FERVOJA MUZEO

La **unua duontaga ekskurso** okazos la 18-an de majo posttagmeze. Unue la partoprenantoj vizitos la Yunnan Fervojan Muzeon. Tiu



*Fervoja Muzeo*

muzeo estis konstruita en 1990, situanta ĉe la Kunminga Norda Fervojstacio, kaj estas sinteza muzeo kun la ĉeftemo "historio de fervoja evoluo en Yunnana provinco". Ĝia totala areo estas 8360 kvadrataj metroj, kaj por konstrui tion la registaro investis pli ol 60 milionojn da RMB-yuanoj. La muzeo konsistas el la sinteza

halo kaj lokomotiva halo, konservante pli ol 9500 valorajn historiajn

fotojn, objektojn kaj dokumentojn de la tri fervojoj kun metra, cola kaj norma ŝpuroj. La muzeo bone konatigas vizitantojn pri la kultura disvolviĝo de fervojoj en la Yunnan-provinco. Ĝi estas la unika "muzeo ĉe fervojstacio" kaj "stacidomo en la muzeo" en Ĉinio.



*Halo de la Muzeo*

La muzeo konsistas el du partoj. La unua estas la Suda halo, kiu estas francstila antikva konstruaĵo, nomata

“Yunnan-a urba fervojstacio” de la centjara Yunnana–Vjetnama fervojlinio. La alia estas la Norda halo, kiu estas moderna konstruaĵo por la pasaĝeroj, plene de la grandrapidaj elementoj. Inter du haloj estas la koridora ponto trans fervojlinioj de la Norda fervojstacio. La muzeo estas unusole konstruita ĉe la funkcia stacio en Ĉinio. La dizela motorvagonaro “MICHELIN” kiel unu el la unuaklasaj historiaj objektoj - faritaj en Francio - estis uzita sur la Yunnan-Vjetnama fervojlinio en 1914, kaj ĝi havis kaŭĉukajn radojn. Krome la ligna trajno, kiel movanta domo sur mallarĝaj reloj kun ŝpuro de 600 mm plejforte logas vizitantojn en la halo.

### VERDA LAGO

Post la pririgardo de la Fervoja Muzeo la partoprenantoj vizitos la Parkon de la Verda Lago (Cuihu-lago). La parko situas sur 24 hektaroj, kiujn oni estigis sur marĉa areo en 1390. La parko famas pro tio, ke ok



*La Verda Lago kun pagodoj*

flankoj de la lago estas verda, bambuo en kvar sezonoj, kaj en printempo kaj somero estas multaj verdaj salikoj. Antaŭ la dinastio Ming la akva nivelo estis alta en Dian-lageto, tie plantiĝis rizo, legomo kaj lotuso, pro tio la loko nomiĝis “Maro de legomoj”. En la lagon fluis naŭ fontoj, pro tio ĝi havis ankaŭ alian nomon “Naŭdraka lago”. En la parko troviĝas kelkaj interesaj vidindaĵoj kiel la Orfiŝa insuleto, Bambuarbara insuleto, Lotusflora monahejo ktp. Multaj pontetoj, belegaj pavilonoj, intimaj vojetoj, milda

flankoj de la lago estas verda, bambuo en kvar sezonoj, kaj en printempo kaj somero estas multaj verdaj salikoj. Antaŭ la dinastio Ming la akva nivelo estis alta en Dian-lageto, tie plantiĝis rizo, legomo kaj

venteto kaj bela birdkanto donas la veran ripozeblecon al la vizitantoj, eĉ tion pliigas la bongusta teo ripozetante en la pavilonoj.

## XISHAN-MONTO

La **dua duontaga ekskurso** okazos posttagmeze la 19-an de majo. Tiu ekskurso kondukos la partoprenantojn al la Xishan monto (Okcidenta monto), kiu situas apud la lago Dianchi sur 700 hektaroj, el kiu nur viziteblas 210 hektaroj. La monto famas pro siaj belegaj pejzaĝoj kun densa arbaro, florantaj floroj kaj ĉiam verdaj herboj. En la antikveco la monto estis honorigita per “la unua bela pejzaĝo en Yunnan”. Se oni rigardas el malproksimo la Xishan-monton, oni



*Interesaj konstruaĵoj en la rokmuro*

povas konstati, ke la monto, kiel belulino kuŝas sur ambaŭ bordoj de la lago Dianchi. Ŝiaj kapo, brusto, ventro kaj gamboj klare videblas, eĉ ŝiaj haroj flirtas senafekte en la ombroj kaj ondoj de la lago, mont-rante belan figuron

kaj ĉarmecon, kvazaŭ dormanta belulino.

Ĉi tie cirkulas legendo. En la antikveco iu princino ne povis sin deteni de soleco en la palaco, sekrete ŝi fuĝis el la palaco kaj edziniĝis al junulo. Poste la reĝo disigis la paron kaj mortigis la junulon. La princino malĝojegis kaj ploregis per senĉesaj larmoj, el kiuj fariĝis la lago Dianchi. Poste ŝi kuŝis surdorse kaj ŝanĝiĝis kiel la Okcidenta monto. La monto kun krutaj rokmuroj montras majeste belajn vidindaĵojn. La plej alta montopinto havas 2440 metrojn super la marnivelo, kaj nur 600 metrojn super la lagonivelo. Nuntempe la monto estas konstruita kiel arbara parko.



## ŜTONARBARO

La **tuttaga ekskurso** okazos merkrede la 20-an de majo. La partoprenantoj per speciala aŭtobuso vizitos tiun mirindan lokon, kiu situas 85 km-ojn for de Kunming. La komforta aŭtobuso traveturas en pitoreskaj pejzaĝoj. La Ŝtonarbaro estis la parto de antikva maro antaŭ 360 milionoj da jaroj en la periodo de devonio de la paleozoliko kaj formiĝis antaŭ 280 milionoj da jaroj en la periodo de karbonio. De malproksime ni povas vidi, ke aroj da griz-nigraj megalitaj pintoj, kolonoj, kiel nebul-nigra arbaro, direktiĝas al la bluan ĉielon, pro tio oni nomas ilin "Ŝtonarbaro". La ĉefa turisma regiono "Liziyng-arbaro" enhavas areon da 12 kvadrataj kilometroj, konsistante el la Ŝtonarbara



*La Ŝtonarbaro kun pavilono*

lago, la Granda ŝtonarbaro, la Malgranda ŝtonarbaro, La vojo inter la ŝtonoj longas pli ol 5000 metrojn. Kiam oni eniras en la arbaron, aperas diversformaj ŝtonoj, ŝtonkolonoj, ŝtonmuroj, iuj el ili altas 40-50 metrojn. La ŝtonoj formas diversajn figurojn, kiel la sanktuloj, roluloj de romanoj, soldatoj, poetoj, patrino kun la filo ktp. Multaj animalformaj ŝtonoj videblas kiel ĉevalo, elefanto, pavo, rinocero, tigro k.a. Ne mankas la plantoformaj ŝtonoj, inter ili diversaj floroj, bambuoj, fungoj ktp. Ankaŭ troviĝas "sonorilaj ŝtonoj", kiuj sonoras malsamtone. Tiun grandegan transforman laboron ne finfaras cizilo kaj martelo, sed la erozio kaj pluvo. Multaj belaj pejzaĝoj kaj vidindaĵoj allogas vizitantojn, ke ili forgesas reveni hejmen. En la arbaro estas diversaj pavilonoj, ŝtonplatformoj, ŝtonbenkoj por ripozi. Ankaŭ estas interesaj vidindaĵoj la Yi-naciaj vestaĵoj, kantoj kaj dancoj, eĉ la bongustaj lokaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estas ŝatataj de la partoprenantoj.

**Han Zuwu**

## Raporto de la kasisto por la jaro 2014 (sumoj en eŭroj)

Enspezoj	2014	2013	Elspezoj	2014	2013
Kotizoj	3480,00	3960,00	IF-presado	1958,00	1570,00
FFK-vendo	22,00	88,00	IF-sendo	1860,00	1548,00
Donaco		44,00	UEA-kotizo	189,00	183,00
			Afrankoj FK	13,00	13,54
			Estraro	902,35	445,26
			Kubo		90,00
			Bankkostoj	16,60	15,85
			ifef.net		29,90
<b>Sumo :</b>	3502,00	4092,00	<b>Sumo :</b>	4938,95	3895,55

FFK-vendoj: en 2013 vendiĝis multaj ĉar la tuta stoko estis aĉetebla dum la kongreso.

IF-kostoj: repago ne estas regula laŭ la jaroj : en 2014 temas pri 7 numeroj.

Estrar-kostoj: ankaŭ ili ne estas regulaj (en 2014 estis fin-repago de kostoj por 2013).

Pro malkresko de la membro-nombro, sumo de kotizoj nuntempe pli-malpli egalas la koston de 6 paperaj IF (po 550 €). Tial, daŭrigo de nur-papera eldonado certe ĉiujare estigus deficiton.

Bilanco je la 31-a de decembro 2014					
Aktivoj	2014	2013	Pasivoj	2014	2013
Banko	265,83	9788,43	Fondusoj diversaj	416,81	1066,81
UEA-konto	10732,84	3955,84	SAEF-Fonduso	1956,05	1956,05
Kaso	846,01	240,36	SAFE-Fonduso	1700,00	1700,00
Ricevotaj kotizoj	270,00	360,00	kongres-Fonduso	112,00	112,00
			„Historia libro (IFEF 100 jaroj)“	1847,70	1847,70
			transito Kunming	118,00	
			por turneo de Kubano		300,00
			jarrezultoj sumigitaj	7311,07	7114,62
			ĉijara rezulto	-1436,95	196,45
			antaŭricevitaj kotizoj 2015	90,00	51,00
<b>Sumo :</b>	12114,68	14344,63	<b>Sumo :</b>	12114,68	14344,63

Banko: plej granda sumo nun estas en la UEA-konto de IFEF. Celo estas nuligi la bankkonton.

Fondusoj diversaj: temas pri kunfando de 5 multjaraj "historiaj" fondusoj, kies celoj tute ne plu kongruis kun realeco. El ĝi estis prenita sumo de 650 eŭroj por helpi al partopreno de Miguel Angel González kaj Barbara Pietrzak en IFEF-kongreso San Benedetto.

Membro-stato		
Lando	2014	2013
Aŭstrio	20	20
Belgio	15	15
Bulgario	15	15
Ĉeĥio	27	27
Ĉinio	15	15
Danio	15	15
Francio	57	60
Germanio	81	92
Hispanio	5	15
Hungario	20	20
Italio	30	40
Japanio	17	17
Kroatio	15	15
Kubo	10	10
Norvegio		20
Pollando	10	10
Rumanio	15	15
Slovenio	10	10
Individuoj (2014: 1 BE + 3 CH + 1 FR + 1 IL + 1 NL + 1 NO + 1 SK)	9	11
	386	442

En la 3 antaŭaj jaroj, malkresko estis meznombro 25 membroj jare, kaj en 2014 estis 56 membroj, interalie pro manko de novaĵoj kaj kotizoj el Norvegio.

Propono de buĝeto por la jaro 2016			
Enspezoj	EUR	Elspezoj	EUR
Kotizoj	3000,00	IF-presado	400,00
FFK-vendo	40,00	IF-sendo	400,00
		UEA-kotizo	200,00
		Afrankoj FK	20,00
		Estontaj agadoj	1100,00
		Estraro	900,00
		Bankkostoj	20,00
		FFK-presado	0,00
<b>Sumo :</b>	3040,00	<b>Sumo :</b>	3040,00

Pro grandega ŝparo en IF-kostoj, disponeblos mono por aliaj celoj (linio "Estontaj agadoj").

**Laurent Vignaud**



## ANONCO

### pri la tagordoj de la komitatkunsidoj dum la 67-a IFK

La tagordojn de la nepublika kaj la publika Komitatkunsidoj por la sekva kongreso ni kutimas aperigi en la dua numero de IF. En la nuna jaro difini la tagordojn dependas de la estrarkunsido de IFEF en Dijon, kiu okazos inter la 13-a kaj 15-a de aprilo 2015. Multajn taskojn havas IFEF ankoraŭ antaŭ la kongreso, kiujn la estraro kaj la invititaj komitatanoj devos trakti en Dijon. IFEF establis sep laborgrupojn, kaj helpe de la du komisionoj provas renovigi kaj ekprosperigi la agadon. En la lasta IFK en San Benedetto, la komitato faris kelkajn gravajn decidojn, al kiu ni devas adapti nian statuton kaj regularon. Ni devas haltigi la malaltiĝon de la membro-nombro de IFEF, eĉ la ĉeson de la landaj asocioj. Ni devas stabiligi la buĝeton, kaj akiri monon kaj subvencion. Ni devas fortigi la rilatojn ekstere kaj interne, plibonigi kaj modernigi la informadon ktp. Pro tio la laborgrupoj devas efike labori kaj fari decidojn, kiujn ni devas trakti kaj aprobi dum la komitatkunsidoj en Kunming. Sed ni devas scii, kiom da komitatanoj partoprenos en la kongreso, ĉu la komitatkunsido havos kvorumon aŭ ne? Se nur malmultaj komitatanoj povos partopreni en la kongreso, tiam ni devas decidi pri multaj temoj en Dijon. Do la tagordoj de la komitatkunsidoj en Ĉinio dependas de la laboro en Dijon. Pro tio verŝajne en la sekva numero de IF mi povos aperigi la tagordojn, eĉ eble en la kongresa libro. Mi proponas al la komitatanoj kaj membroj de la komisionoj kaj laborgrupoj por partopreni en la estrarkunsido de IFEF en Dijon.

**La Redaktoro**

### **Tagordo por la kunveno de la Faka Komisiono dum la 67-a IFEF- kongreso**

1. Bonvenigo kaj enkonduko fare de la FK-gvidanto.
2. Elektoj:
  - a) gvidanto de FK (nuna Jan U. NIEMANN, reelekteblas)
  - b) sekretario de FAS (nuna Ladislav KOVÁR, reelekteblas)
  - c) sekretario de TS (nuna Heinz HOFFMANN, reelekteblas)
  - d) redaktoro de TeKu (nuna Heinz HOFFMANN, reelekteblas)
3. Raporto de la Fake aplika sekcio-sekretario.
4. Raportoj pri fake aplika laboro en unuopaj IFEF landaj asocioj.
5. Fakaj programeroj dum la 67-a IFK.
6. Raporto de la Terminara sekcio-sekretario.
7. Raportoj de la TS-kunlaborantoj (kaj landaj kaj individuaj).
8. Trakto de nocioj laŭ informoj en Terminaraj Kurieroj.
9. Fakaj programoj dum la 68-a IFK.
10. Novaj taskoj por la sekcioj.
11. Eventualaĵoj (sub tio korektado de la adreslisto).

**Jan U. Niemann**

## LA 31-a INTERNACIA FESTIVALO EN JÜLICH

27.12.2014 - 03.01.2015

**Kadra temo: Novaj energioj**

La ĉi-jara Internacia Festivalo (IF) estis vere la lasta. Enskribiĝis 106 personoj el 18 landoj. Tamen kelkaj ne povis ĉeesti pro diversaj kialoj. Sed aperis novuloj, kiuj bedaŭris ne malkovri la IF-on pli frue. Dum la tuta semajno regis familia etoso, en kiu ĉiuj ĝoje amuziĝis post la vespera programo en la “Knajpo”. La program-oferto, kiel ĉiam, estis bunta, aperis kelkaj kromaj programeroj. Ĉiu povis elekti laŭ sia plaĉo. Kun bedaŭro ni konstatis la forpason de Rémy Bouchet al kiu ni omaĝis per kelkaj vortoj kaj rememoroj en la Interkona vespero.



*Silvestra nokto*

kontribuis ĉefe Alfred Schubert per prelegoj pri “Energi-ŝanĝiĝo en Germanio” kaj “Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj”. Krom tio okazis jam la 8-an fojon IVU-prelegoj (Internacia Vintra Universitato) agnoskitaj kiel AIS sesioj. Okazis ekzamenoj, kaj en la Adiaŭa vespero oni disdonis atestilojn al la sukcesintoj. Kadre de IVU Amri Wandel prelegis pri “La scienca revolucio de Einstein - 2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco” kaj pri “Vivo sur foraj planedoj – la revolucio de la spac - teleskopo Kepler”. En iu sennuba vespero ni havis okazon spekti

La vetero favoris nin kaj instigis al pluraj promenadoj en la urbo kaj en la apuda parko. La novkonstruita IF-ejo laŭ hoteleca stilo estas tre komforta kaj ĝi plaĉis al ĉiuj. En la manĝejo ni mem priservis nin kaj la manĝo estis bongusta.

Al la kadra temo

la ĉielon kaj Lunon per malgranda teleskopo kun klarigoj de Amri. Dieter Kleemann prelegis pri “Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko en la lando”. Mikaelo Bronŝtejn parolis pri “La monda E-literaturo: enspezo de Rusio”. Krome li prelegis pri “Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu frataj?”, klarigante ĉefe la historion de Ukrainio.

Same kiel en aliaj IF-oj ni povis ekscii pri la rusa eldonejo Impeto kaj Anna Striganova rakontis pri fabelaj mondoj kaj montris siajn pupkreaĵojn. En aliaj prelegoj ni eksciis pri “Vegana vivo el propra sperto” de Klaus Friese. Harald



*Muzika vespero*

Schicke parolis pri “Alia alirmaniero al malsanoj”. Aŭtoran horon pri siaj libroj havis Nora Caragea. La profesia ĵurnalisto Alfred Schubert informis pri la funkciado de gazetara sistemo. Lia prelego titoliĝis “Efike kunlabori kun ĵurnalisto” kaj krome li instruis nin kiel bone foti. André Weber malkovris kaj diskutis pri siaj spertoj rilataj al malgrandaj gajnoj: “Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj”. Li ankaŭ gvidis posttagmezan ekskurseton al elfosejoj en la regiono de Hambach kaj al biogas-produktejo. Dieter Rooke animis lecionon pri didaktiko. Pri ĝemelaj urboj interesiĝas kaj klarigojn pri ili donis Pieter Engwirda. Prelego de Ian Fantom titoliĝis: “La Kaiser, Titanic kaj la Unua Mondmilito”. Karl Breuninger parolis pri sia eksterordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio dokumentita per multaj bildoj.

Matene oni povis ekzerci “Tai-chi-chuan” kun Barbara Poterucha kaj poste malstreĉiĝi per dancgimnastiko kun Vera Vlasova. Kelkaj partoprenantoj ankaŭ plurfoje profitis saŭnadon. Dum la kafopaŭzoj ĉiuj vigle babilis aŭ rigardis fotoalbumojn de Liba Gabalda pri ĉiuj IF-oj, kiujn ŝi kun Floreal ĉeestis. Ili ankaŭ projekciis filmon pri rememoroj el diversaj IF-oj.

Entute ili partoprenis 23-foje. Tiom plaĉaj la festivaloj estis. Ankaŭ Brian Moon prezentis lastjaran IF-on en retrospektivo. Liba organizis la dancvesperon laŭ la latinamerika muziko, ne mankis ŝiaj hejmfaritaj kuketoj. Bone funkciis la libroservo prizorgita de Paul Peeraets kaj Jean Luc Thibias.

Oni spektis kelkajn bildprezentojn pri diversaj vojaĝoj fare de niaj partoprenantoj. Barbara Muhlemann prezentis kaj parolis pri sia vojaĝo en Argentino okaze de la 99-a UK, Amri Wandel vizitis kaj rakontis pri siaj vojaĝspertoj en Hindio, Liba kaj Floreal montris filmon pri Nepalo de Roman Dobrzyński. En marto ili partoprenis la Specialan Renkontiĝon organizitan de nepalanoj kaj poste ili kune vizitis la orientan parton de la lando.

La ĉi-jara tuttaga ekskurso gvidis nin al Kolonjo, kie ni unue promenis en la urbo sub ĉiĉeronado de Winfried Schumacher, kiu tie loĝas. En restoracio, kie ni tagmanĝis ni renkontis kun Bruno Knapstein kaj kun lia edzino. Li estis longjara partoprenanto kaj kunhelpanto de IF-oj. Pro sia aĝo li ne povis partopreni dum la lastaj du jaroj.

En vesperaj programeroj sonis la E-kantoj de latvaj kaj rusaj partoprenantoj, koncertis Nataša Bertse el Svedio. En la Internacia vespero niaj talentuloj prezentis kantojn, dancojn, amuzajn skeĉojn, akordionan kaj gitar-ludadon. Specialan muzikon sen vera instrumento prezentis Waldemar Ebel per plasta strio inter siaj lipoj.

Silvestraj bufedo kaj balo, kiu komenciĝis per polonezo, estis plurfoje interrompita pro festado de diversaj Novjaroj. Tio ebligis multfojan tostadon, brakumadon kaj interkisadon de la ĉeestantoj.

La lasta vespero - adiaŭa Internacia Festivalo estis triste festena. Hans-Dieter Platz (HDP), la ĉef-organizanto de la aranĝo ofertis glason da ŝaŭmvino kaj donacis al ĉiuj DVD-diskon kun fotoj de ĉiuj IF-oj. Li kore dankis al ĉiuj kunhelpantoj kaj prelegantoj. Ankaŭ ni dankis lin pro IF-oj, kiujn li tiel bone kaj profesie organizis. Bona etoso regis ĝis malfruo en la apuda enirhalo. Tiel finiĝis la longjara internacia festivala tradicio kun nostalgio daŭrigi...

**Liba Gabalda**

## Kiu posedas kion?

Ofte, kiam oni legas la tagĵurnalojn aŭ aŭskultas la radion, oni sin demandas, kiu posedas kion. Precipe en tiuj jaroj ... multaj entreprenoj havas starpunkton en pluraj landoj, kaj estas malfacile juĝi pri la vera aparteneco.

Ankaŭ mi ofte pri tio cerbumas, kaj rilate al mia (nun antaŭa) laborloko, la fervojo, kaj aliaj transport-entreprenoj en Danio mi vere deziris esplori. Montriĝis rapide, ke tio ne limigas sin al la danaj landlimoj, sed ankaŭ la rilatoj inter diversaj entreprenoj en tiu flanko de la komerca vivo estas araneaĵo en la plej subtila formo!

Pri tio, nome tiuj entreprenoj kaj ligoj en Danio aperis artikolo en Dana Fervojisto 2/2014. La laboro pri tio igis min scivolema, ĉu en aliaj landoj la afero estas same ne-travidebla. Juĝu mem:

### Britio

En Britio antaŭe la fervojojn posedis la ŝtata *British Rail (BR)*, sed en la jaroj, kiam Margaret Thatcher estis ĉefministro (1979-1990), unu el ŝiaj plej gravaj punktoj estis privatigo – de ĉio, ankaŭ de la fervojoj.

Per malfermo de la merkato, oni disigis la landon en partojn, kaj entreprenoj povis oferti sian servon. Post tio fervojaj ekspluatantoj povis esti ĉiuj entreprenoj – nome memstara firmao, aŭ firmao apartenanta al pli granda 'grupo'. Kelkaj el la entreprenoj ricevis taskojn en pluraj el la 'partoj', - ekzemplo estas **First Group**, kiu tute aŭ parte posedis la entreprenojn:

*First Capital Connect, First Great Western, First Hull Trains*

*First Train Pennine Express, Heathrow Connect kaj Scot Rail.*

(kaj ni ja scias, ke la entrepreno havas ankaŭ 'eksterlandajn aventurojn' ekz. *DSB First...*)

Fariĝis tuta ĥaoso por tiuj, kiuj deziris havi superrigardon.

La celo de tiu privatiga procezo estis rompi la monopolon de la ŝtata BR, sed montriĝas nun, ke grandan nombron de la fervojoj en Britio ekspluatatas ŝtataj entreprenoj de aliaj eŭropaj landoj – ekzemplo estas **Keolis**, kiu posedas parton de:

*Gatwick Express, London Midland, Southeastern kaj Southern* (pere de parta posedo – 35% – de alia firmao Govia) ... kaj 51% el *Keolis* posedas SNCF.

**Abelio** posedas *Greater Anglia Trains*, kaj *Abelio* estas la komerca flanko de NS, la Nederlandaj Ŝtataj Fervojoj, kaj la ŝtata Germana Fervojo DB posedas 100% **Arriva** (*Arriva Trans Wales, Chiltern Railways, Cross Country*) kaj 50% *London Overground Rail Operations* kies aliaj 50% posedas **MTR** (Hongkonga bus- kaj pasaĝertrajna-kompanio – 75% el ĝi posedas la Hongkonga registaro).

Se oni provas fari superrigardon, oni povas tabeligi tiel:

<b>Iama <i>British Rail</i> estis dividitaj</b>	<b>Privatigita al entrepreno</b>	<b>Eksterlandaj posedantoj</b>
<i>Inter City Cross Country</i>	<i>Cross Country Trains</i>	DB
<i>Network South East Chiltern</i>	<i>Chiltern Railway</i>	DB
<i>Merseyrail</i> (part of <i>Regional Railways</i> )	<i>Merseyrail</i>	NS
<i>Regional Railways</i>	<i>ArrivaTrains Wales</i>	DB
<i>Regional Railways</i>	<i>Northern Rail</i>	NS
<i>Inter City East Coast</i>	<i>Grand Central</i>	DB
<i>Inter City Anglia</i>	<i>Greater Anglia</i>	NS
<i>Network South East</i>	<i>London Overground Rail Operations</i>	50% DB 50% MTR
<i>Network South East kaj Regional Railways</i>	<i>London Midland</i>	35% SNCF
<i>Network South East</i>	<i>Southern Trains</i>	35% SNCF
<i>Network South East</i>	<i>Southeastern Railway</i>	35% SNCF
<i>Regional Railways</i>	<i>First Trains Pennine Express</i>	35% SNCF

*DB Schenker Rail (UK) Ltd* (100% DB) la plej granda vartrajna-kompanio en Britio.

## Germanio

En Germanio ekzistas nun privatigitaj fervojlinioj kaj ankaŭ linioj, kiujn posedas la ŝtata Germana Fervojo DB, sed parte aŭ tute ekspluatas alia trafik-entrepreno.

Nomo	Posedanto(j)
<i>BeNex</i> 'Patrino-kompanio'	51% <i>Hamburger Hochbahn</i> kiu estas 100% posedaĵo de <i>Freie und Hansestadt Hamburg!</i>
<i>Metronom</i>	69,9% <i>Niedersachsen Bahn</i> , 25,1% <i>BeNex</i> kaj 5% <i>BSAG</i> .
<i>Ostdeutsche Eisenbahn</i> (ODEG)	50% <i>BeNex</i> kaj 50% <i>Prignitzer Eisenbahn</i> .
<i>Gesellschaften der Netinera-Gruppe mit Schienenverkehr.</i> 'Patrino-kompanio'	51% <i>FS. Anatŭe</i> estis <i>Arriva Deutschland</i> , laŭ EU-leĝoj <i>DB</i> ne rajtas posedi
<i>Osthannoverische Eisenbahnen</i> (OHE)	87,5% <i>Netinera</i> .
<i>Erix</i>	100% <i>OHE</i> .
<i>Niedersachsen Bahn</i> 'Patrino-kompanio'	60% <i>OHE</i> .
<i>Prignitzer Eisenbahn</i> (PEG)	100% <i>Netinera</i> .
<i>Regentalbahn</i>	100% <i>Netinera</i> .
<i>Regentalbahn Cargo</i>	100% <i>Netinera</i> .
<i>Alex Arriva-Länderbahn-Express</i>	100% <i>Netinera</i> .
<i>Berchtesgadener Land Bahn</i> (BLB)	50% <i>Regentalbahn</i> .
<i>Vogtlandbahn</i> (VBG)	100% <i>Regentalbahn</i> .
<i>Eurobahn</i>	100% <i>Keolis</i> , kiu estas 70% posedaĵo de <i>SNCF</i> .
<i>ITL – Eisenbahngesellschaft mbH</i>	100% <i>Captrain</i> , kiu estas 100% posedaĵo de <i>SNCF Geodis</i> .
<i>Bayerische Cargo Bahn</i> (BCB)	100% <i>Captrain</i> .
<i>Dortmunder Eisenbahn</i> (DE)	100% <i>Captrain</i> .
<i>Farge-Vegesacker Eisenbahngesellschaft</i> (FVE)	98% <i>Captrain</i> .
<i>Hansebahn Bremen</i> (HBB)	51% <i>Captrain</i> .
<i>Hörseltbahn</i> (HTB)	



<i>Industriebahn-Gesellschaft Berlin mbH (IGB)</i>	50,21% <i>Captrain</i> .
<i>Niederbarnimer Eisenbahn (NEB)</i>	100% <i>Captrain</i> .
<i>Rail4 Captrain</i>	100% <i>Captrain</i> .
<i>Regiobahn Bitterfeld Berlin (RBB)</i>	100% <i>Captrain</i> .
<i>Teutoburger Wald Eisenbahn (TWE)</i>	100% <i>Captrain</i> .
<i>Weserbahn</i>	100% <i>Bremer Straßenbahn AG</i> , kiu estas 100% posedaĵo de <i>Hansestadt Bremen</i>
<i>Chem Oil Logistics AG</i>	100% <i>SBB Cargo</i>

### Kaj nur kelkaj ekzemploj de aliaj landoj:

#### Norvegio kaj Svedio:

*MTAB* 100% *LKAB* (100% la sveda ŝtato)

vartrajnoj *Narvik-Kiruna/Gällivare-Luleå*

*Cargo Net* 55% *NSBog* 45% *Green Cargo* (100% la sveda ŝtato).

#### Pollando:

*FerPolska* 100% *R4C*.

#### Hungario:

*Rail Cargo Hungaria* (ekz. *MAV Cargo*) 100% *Rail Cargo Austria* (100% *ÖBB*).

#### Francio:

*Euro Cargo Rail (ECR)* (100% *DB Schenker Rail (UK) Ltd.*) vartrajnoj en Francio.

#### Nederlando:

*Syntus* (100% *Keolis*) trajn- kaj buslinioj en la orienta parto de Nederlando.

#### Plurlande:

*SBB Cargo* veturas ankaŭ sub propra nomo vartrajnojn en i.a. Germanio, Italio kaj Nederlando.

*ERMEVA Group* (100% *SNCF*) posedas pli ol 58.000 varvagonojn kiuj trafikis en tuta Eŭropo.

Du mondskalaj ekzemploj:

Nomo de la posedanto	Okupiĝas pri
<p><i>AnsaldoSTS</i>  <i>Ansaldo Breda</i>                      100%  <i>Finmeccanica</i>                      – kaj el ĝi posedas la itala ŝtato 30%!</p>	<p>Konstruado kaj ekspluatado de metrooj en <i>Brescia</i>, <u><i>Genua kaj Napoli</i></u> (Italio), <u><i>Kopenhago, Lima</i></u> (Peruo), <u><i>Birmingham kaj Manchester</i></u> (Britio), <u><i>Dublino kaj Riyadh</i></u> (Saud-Arabio) – <u>survojas <i>Honolulu</i></u> (Usono)</p>
<p><i>RATP</i>                      la franca ŝtato 100%!</p>	<p><u><i>Autolinee Toscane</i></u>, trajnoj en la regiono de Florenzo.  <u><i>Azienda Mobilità e Trasporti</i></u>, publika transportreto de <i>Genova</i>, Italio  <u><i>Bath Bus Company</i></u>, pere de <u><i>City Sightseeing</i></u>, buslinioj en <u><i>Bath, Eastbourne, Windsor</i></u> kaj <u><i>Cardiff</i></u>, Britio  <u><i>Casablanca tramway</i></u>, tramojn en <u><i>Casablanca</i></u>, Maroko  <u><i>Dolomiti Bus</i></u>, enurbaj kaj regionaj busoj en <u><i>Belluno</i></u>, Italio  <u><i>Ferroviaria Italiana</i></u>, regiona trajn- kaj bus-linioj en Toskanio, Italio  <u><i>Fullington Auto Bus Company</i></u>, buslinioj en la nordorienta parto de Usono  <u><i>Gautrain</i></u>, inter-urbaj trajnoj en Suda Afriko  <u><i>Gem Bus</i></u>, translimaj buslinioj, en la regiono de Ĝenevo, do en Francio kaj Svisio  <u><i>Hong Kong Tramways</i></u>, tramlinioj en <i>Hong Kong</i>, Ĉinio  <u><i>London United</i></u> kaj <u><i>Quality Line/Epsom Coaches</i></u>, buslinioj en Londono.  <u><i>Manchester Metrolink</i></u>, tramlinioj en regiono <u><i>Greater Manchester</i></u>, Britio  <u><i>McDonald Transit Associates</i></u>, urtransport-ekspluatanto en Usono  <u><i>RATP Do Brasil</i></u>, metrolinio 4 de <u><i>Sao Paulo Metro, Sao Paulo</i></u>.  <u><i>Reolian Public Transport Co.</i></u>, urbaj busoj en <u><i>Macau</i></u>, Ĉinio  <u><i>Selwyns Travel, Runcorn</i></u>, buslinioj en nordokcidenta Britio  <u><i>Algiers Metro</i></u>, metroon de <i>Algiers</i>, Alĝerio  <u><i>VTRA</i></u>, metrolinio 9 de la <u><i>Seoul Metro, Seoul</i></u> kaj metrolinio 1 de la <u><i>Mumbai Metro, Mumbai</i></u>, Hindio.  <u><i>Yellow Buses</i></u>, buslinioj en <u><i>Bournemouth</i></u>, Britio  <u><i>Quality line Epsom Coaches</i></u> buslinioj en <u><i>Epsom</i></u> kaj Londono</p>

## Kaj laste oni ne forgesu ekzemplojn de tramvoj-, metro- kaj fervojkonstruado:

**Infranord** (100% la sveda ŝtato) konstruas kaj renovigas fervojojn en tuta Skandinavio.

Pri la franca entrepreno **Systra** (42% RATP kaj 42% SNCF) mi eltrovis pri la lastpasintjaraj aktivecoj sub 'Internacie':

2012: *Systra* transprenas la projektestraron de la piliĝo de la verda linio de la metroo en Bankoko

2012: Inaŭguro de la linio 2 de la metroo en Sofio.

2012: *Systra* subskribas kontrakton pri projektestraro kaj supervido de la konstruo de tramvojo en *Al Safouh, Dubai*

2012: *Systra* inaŭguras la metroon en *Uijeongbu*, Suda Koreio

2012: Inaŭguro de la tramvojo en *Casablanca*, la dato estis 12/12/12 ...

2012: Du novaj linioj de la metroo en Santiago de Chile

2011: Prepara esploroj por metroo en Bagdado.

2011: Prepara esploroj kaj studoj por la metroo de *Panama*

2011: Inaŭguro de fazo 1 de tramvojo en *Algiers*, Alĝerio, kie *Systra* estas projektestraro

2011: Eklunkias la verda linio de la metroo de *Dubai*, kie *Systra* estis projektestraro

2008 - 2009: Ĉefdesegnaĵoj kaj –diagramoj por la grandrapidaj linioj *LGV* de Britio

2007 - 2013: Projekt- kaj supervidaj taskoj je la instalado kaj laboroj ĉe la unua metro-linio en Hanojo.

2007 - 2009: Tenika konsilada laboro por la tramvojo de Jerusalemo.

2007 - 2009: Prepara studoj por la unua metrolinio de *Damas*, Sirio

2007 - 2009: Konsilado por la fervojoj de Makedonio

2006–ĝis nun: Helpo pri projektestraro de la estonta rapidtrajna *HST California* (Kalifornio)

Ĉu vi nun komprenas, kiel facile oni dum jaroj sukcesis trompi multajn politikistojn kaj 'ordinarulojn' per la vortoj LIBERALIGO kaj PRIVATIGO ?... laŭ ni (kaj parte pruvita per tiu artikolo) certe ne temas pri privatigo, sed nur pri plifortigo de la 'konkurenca faktoro', ĝenerale je la kosto de la laborkondiĉoj de la dungitoj kaj kun malkonstruo de ĝis nun bone funkciantaj kaj trarigardeblaj strukturoj - NUR por havi profiton, ne al la propra ŝtato, sed al kompanioj de najbaraj aŭ eĉ foraj ŝtatoj.

Oni povas demandi sin, ĉu konservado de ĝis nun bone funkciantaj kompanioj sub pli bona propra kontrolo (i.a. la rajto doni profiton!) tamen ne estas pli 'humana' kaj 'komforta', ne nur por la laboristoj, sed ankaŭ por la uzantoj/klientoj. Ekzemplo: kiom el vi scias ekzakte al kiu vin turni, se 'via trajno' malfruiĝas...certe NE helpas grumbli al la kontrolisto, li/ŝi estas nur dungito de kompanio, kiu pensas pri profito de biletvendado, kaj la trajnoj de tiu entrepreno veturas laŭ horaroj faritaj de ŝtataj instancoj, kiuj volas tro eluzi la reton sen pagi tro por ties plibonigo....

Ni povas danki al precipe *Margaret Thatcher* pro la 'mizeroj', kiu inkluzivas misinterpreton de la vortoliberaligo (de la trakoj de Eŭropo), kiun oni siatempe multe diskutis en la Eŭropa Parlamento dum preparo de EU-direktivo pri evoluo de fervojtrafiko en Eŭropo (91/440/EØF).

Vi povas mem legi en via propra lingvo ĉi-tie: [http://eur-lex.europa.eu/smartapi/cgi/sga\\_doc?smartapi!celexplus!prod!CELEXnumdoc&lg=da&numdoc=391L0440](http://eur-lex.europa.eu/smartapi/cgi/sga_doc?smartapi!celexplus!prod!CELEXnumdoc&lg=da&numdoc=391L0440) – parto III temas pri la disdivido inter 'reloj' kaj la 'uzantoj de ili' – parto V temas pri la 'liberaligo' – iom ironie estis unu el la verkistoj de tiu misinterpretita verko *Neil Kennock*, iama sindikatestro kaj 'ombro-ĉef-ministro' por la Laborista Partio, kiam la Konservativa Partio gvidis la Unuiĝintan Reĝolandon.

**Jan U. Niemann**

Reviziis: **Heinz Hoffmann**

## INTERNACIA FERVOJISTO

64-a eldonjaro

Dumonata fervojfaka Revuo en  
Esperanto kaj organo de  
Internacia Fervojista  
Esperanto-Federacio

Prezidanto: Rodica Todor  
(Rumanio)

[rodica\\_todor@yahoo.com](mailto:rodica_todor@yahoo.com)

Vicpr: Sylviane Lafargue  
(Francio)

[sylviane.lafargue@dbmail.com](mailto:sylviane.lafargue@dbmail.com)

Sekretario: Vito Tornillo  
(Italio)

[vitorni@virgilio.it](mailto:vitorni@virgilio.it)

Kasisto: Laurent Vignaud  
(Francio)

[laurent.vignaud@free.fr](mailto:laurent.vignaud@free.fr)

Redaktora Komisiono:  
Gvidanto: István Gulyás  
(Hungario)

[istvan.gulyas@hdsnet.hu](mailto:istvan.gulyas@hdsnet.hu)

Membroj: J. Patay,  
J. Ripoché

Franca poŝtĉekkonto:  
Ĉekoj aŭ ĝiroj al  
„Laurent Vignaud”  
9 293 74 Y NANTES  
IBAN:

FR3320041010110929374Y03237

BIC-kodo:PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Apermonatoj:

januaro, marto, majo, julio,  
septembro, novembro

Redaktofino:

Ĉiam la 10-an de la antaŭa  
monato

ISSN 0230-323x

[www.ifef.net](http://www.ifef.net)

Faka Komisiono:

GV: Jan Niemann

[niemann@kabelmail.dk](mailto:niemann@kabelmail.dk)

SK: D-ro Heinz Hoffmann

[hoffmann-ifeff@cablemail.de](mailto:hoffmann-ifeff@cablemail.de)

SK: Inĝ Ladislav Kovář

[kovar.lad@email.cz](mailto:kovar.lad@email.cz)

## JÁNOS PATAY

(18.02.1929 – 30.01.2015)



Post longa kaj grava malsano en januaro mortis János Patay, nia kara amiko, eminenta esperantisto. Li estis fervojisto, kaj laboris en multaj terenoj de la Hungaraj Ŝtatejoj.

Lia Esperanto-aktiveco estis ekzemplodona. Ekde 1964 li estis membro de la Hungaria Esperanto-Asocio, kaj ekde la jaro 1969 de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Preskaŭ ĉiuj terenoj de la fervojista E-movado li agadis ĝis la morto. Li estis sekretario de nia Asocio, komitatano ĉe IFEF, redaktoro de la faka revuo Hungara Fervojista Mondo, lingvoinstruisto, LKK-sekretario en kvar IFEF-kongresoj okazintaj en Hungario ktp. Nenombrela fakprelego, redaktado de fakvortaro, lektoro, ekzameno en la Hungara Lingvoinstituto estis ligitaj al Patay. En la lastaj jaroj li estis membro de la Redaktora Komisiono de IFEF.

Li ne konis limojn en la laboro. Li estis humana, klera, entuziasma, senlaca, altruista, helpopreta, sincera, amikema, vera homo. En la tuta mondo oni konis lin, eĉ ne nur la fervojistaj esperantistoj. Pro lia multflanka, efika kaj entuziasma agado li ricevis gravajn ŝtatajn kaj Esperanto-distingojn, inter ili en 2000 „Honora Membro de IFEF”. János Patay forlasis nin, sed la memoro pri li restos por ĉiam ĉe ni. Li ripozu en Paco!

HFEA